N. N. 12,

# Nek fajro, nek la karb'

*tradukita de Joachim Gießner*

1. Nek fajro, nek la karb'
brulas per tia arda flam',
|:kiel amo sekreta,
enŝlosita kora am'. :|

2. Nek rozo, nek diant'
floras en tia belec',
|: kiel du geamantoj
kunstarantaj en solec'. :|

3. Ho mia tuta koro
ja estas spegul'.
|: Ĝi montras, ke mi vin amas,
ĉiam restos fidelul'. :|

*Traduko de la Germana poemo "Kein Feuer, keine Kohle" de N. N. 12 en Esperanton de* JOACHIM GIESSNER *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-395-785 (2007-03-28 10:52:07)*

*Mi, Manfred Retzlaff, detajpis tiun tradukon de Joachim Gießner el folio kun letero, kiun skribis al mi en 1987-11-24 s-ro Joachim Gießner.*